

Manfred Hausmann,

La perloj

tradukita de Manfred Retzlaff

Vi, kvankam scias vi, ke ja ligita
 kun man' kaj kor' al edzo estas mi,²
 de vi al mi sekrete alsendita
 jen estas tiu perl-par' ĉi.

Freneza devas esti vi - mi devas
 konfesi, ke feliĉon sentas mi
 la perlojn rigardante - Ĉu mi revas? -
 Ĉu vera estas tio ĉi?

Kaj nia dom' en sia olda brilo
 sin levas ĉe la reĝa ĝardenar'.
 Jen mia edz' kun sia batalilo,
 la estro de l' reĝ-gardistar'.

Kaj kion ankaŭ pensis menso via,
 dum vi al mi ofertis tion ĉi,
 Mi ja promesis, ke ĝis morto mia
 fidela volas resti mi.

Reprenu la donacon senespere!
 Se iam estus renkontintaj ni,
 - sed tion povis ne okazi vere -
 ja estus eble via mi.

...

²aŭ: al edzo, ho sinjoro, estas mi,

*Traduko de la Germana poemo "Die Perlen" de MANFRED HAUSMANN (*1898-09-10 – †1986-08-06) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04).*

Arg-888-1770 (2013-06-04 23:53:48)

Pri la poeto vidu ankaŭ la retejon <http://history.cultural-china.com/en/59History8512.html>.